

Kelkaj komentoj de Sergio Pokrovskij

pri vortordo en Esperanto kaj la Raporto de la Gramatika Sekcio

Enhavo

- [1. Pri la Raporto](#)
- [2. Pri la libero](#)
 - [2.1. La komunika strukturo de frazo](#)
 - [2.2. Ĉu do libera?](#)
 - [2.3. La lingvoj rigidordaj](#)
- [3. Emfazo kaj la pragmatika vortordo](#)
- [4. Aliaj menciindaj aferoj](#)
 - [4.1. Kromtemoj, kuliso, ligaĵo](#)
 - [4.2. Ambigueco](#)
 - [4.3. «Ne» kiel remaigilo](#)
 - [4.4. Frazoj kontrastigaj](#)
 - [4.5. Rilato al alternativaj konceptoj](#)
- [5. Konkludo](#)

1. Pri la Raporto

Ĉi tiujn komentojn mi prezentas ne kiel direktoro de la Gramatika Sekcio, sed kiel ties individua membro. Formale ili do estas mia «aparta opinio».

Esence mi plene konsentas kun la enhavo de la Sekcia Raporto; mi malsamopinias pri ĝia intencita rolo, kiu influis ĝiajn ampleksojn kaj stilon.

Laŭ mi, la decidoj de la Akademio ne evitu la problemojn kaj terminojn de la avangarda lingvoscienco. AdE gvidu la fakulojn, la esploristojn, verkistojn kaj instruantojn, kiuj povas popularigi ilin kaj laŭe aranĝi sian agadon. Aliflanke, multaj esperantistoj estas amatoraj lingvistoj, kaj iom da teorio ne fortimigus ilin. Certagrade miaj komentoj estas ekzemplo pri tia kompletiga teksto.

Tamen la plimulto da sekcianoj insistis pri rekta kompreneblo de la Raporto por la vasta publiko, kaj pri ĝia uzeblo kiel lernomaterialo.

Sekve la Sekcio forigis el la unua versio de la Raporto indikojn pri la speco de «libero» de la esperanta vortordo, kaj pri la diferenco de la funkcioj de la vortordo en la lingvoj liberordaj kaj rigidordaj. Tio devus «simpligi» la Raporton, fari ĝin pli facile komprenebla por la vasta publiko.

Mi opinias alie. Laŭ mi, klarigo de la diferencoj en funkciado de la alternativaj lingvaj meĥanismoj helpas pli bone kompreni ilin. Tial en ĉi tiuj komentoj mi prezentos tiujn forigitajn indikojn — kaj faros tion pli detale ol konvenus en oficiala sekcia raporto (ja tio estas mia *aparta opinio*). Do, eble estas bona, ke tiu forigo donis al mi okazon pritrakti la temon.

Nek la Raporto, nek ĉi tiuj komentoj elĉerpas la vortordan temaron. Ĝia plena pritrakto postulus ampleksojn superantan la formaton de akademia dokumento.¹ Ni donas nur kelkajn orientilojn,

1 Ekz-e, lernilo pri la vortordo en la rusa lingvo okupas 240 paĝojn (O.A. Крылова, С.А. Хавронина: Порядок слов в русском языке. М.: Русский язык, 1986). Kvankam Esperanto estas multe pli simpla, tamen eĉ por ĝi same detala traktado postulus kelkdek paĝojn.

kiuj komprenigas la principon sur la materialo de simplaj indikaj propozicioj. La esploristoj verku pli detalajn studaĵojn esperantologiajn; la instruistoj aranĝu la lernomaterialon atentante la apartaĵojn de la hejmlingvo de siaj lernantoj.

2. Pri la libero

Esperanto estas lingvo fleksia, kaj tio ebligas variu la ordon en kiu la frazmembroj aperas en la frazo. Ekz-e la frazoj:

- (1) Petro vidis Paŭlon.
- (2) Paŭlon vidis Petro.
- (3) Paŭlon Petro vidis.

Ĉiuj estas validaj kaj eĉ samsignifaj semantike: en semantika reto oni povus unuece esprimi ilian signifon per la rilato

vidis (kiu = Petro, kiun = Paŭlo)

2.1. La komunika strukturo de frazo

Sintakso kaj *semantiko* estas du partoj de la ĝenerala teorio pri signosistemoj, *semiotiko*. La publiko grandparte konas tiujn 3 vortojn; malpli multaj scias pri la tria parto de semiotiko, *pragmatiko*, kiu traktas la manieron prezenti kaj interpreti la komunikaĵojn (praktike oni plej ofte traktas tiajn aferojn sub la nomo *stilistiko*, kiu striktasence rilatas al parto de pragmatiko). La PIV-oj konas nek pragmatikon, nek semiotikon.

Ĝis la mezo de la 19^a jc la lingvistoj opiniis, ke la vortordon regas la sintakso, kaj priskribis ĝin per ordo de frazmembroj. Devio de preskribita vortordo estis perceptata kiel esprimo de ia mensa perturbo kaŭzata de emocio. En la sama maniero de antaŭ du jarcentoj traktas la vortordon multaj niaj lerniloj (i.a. PAG, PMEG).

En la jaro 1844^a aperis la verko² de judgermandevena franca helenisto *Henri Weil*, kiu (uzante la materialon de la klasikaj lingvoj) dispartigis la *sintaksan strukturon* (esprimeblan per la fleksioj) disde la *pensofluo*, manifestiĝanta per la vortordo. La informanto komencas per *deirpunkto* (*point de depart*), prezentanta ideon komunan al la informanto kaj la informato, kaj kondukas al la komunikata ideo, la *dircelo* (*but du discours*).

Tio koheras kun la observo³ de kolego *Michel Duc Goninaz* pri la vortordo en la plenformaj esperantaj respondoj, kiuj komenciĝas per ripeto de la komuna ideo (la deirpunkto = la temo), kaj finiĝas per la informo (la dircelo = la remao):

Al la demando «kio nova pri la kato?», la respondo estos «la kato manĝis la bifestekon»; al la demando «kio nova pri la bifesteko?», la respondo estos: «la bifestekon manĝis la kato». La rezulto estas la sama, varias nur la maniero ĝin prezenti. Mencionu unuavica de la rekta objekto ne estas escepto, stila apartaĵo, kaprico de poeto. Tia ĝi povas esti en Ido, ne en Esperanto.

Pedagogie trejnado pri respondado per tiaj plenaj frazoj eble povus esti taŭga maniero instrui la ĝustan esperantan vortordon sen enkonduki la terminojn «temo» kaj «remao» kiuj, laŭ la opinio de multaj sekcianoj, timigus la lernantojn.

2 H. Weil: De l'ordre des mots dans les langues anciennes comparées aux langues modernes. Thèse principale française. Paris, 1844.

3 Michel Duc Goninaz: Kelkaj rimarkoj pri la t.n. «akuzativo». LODE №257 (2016:3).

La verko de *H. Weil* ĝuis sukceson: en Francio aperis 3 eldonoj, angla traduko aperis en Usono (Bostono, 1878). Tamen ĝenerale liaj ideoj restis periferiaj por la okcidenta lingvoscienco; pli prosperis ili en Rusio kaj Germanio.

Pli vastan internacian akcepton la pragmatika-komunikada teorio ŝuldas al la Praga Lingvoscienc-a Skolo (de post 1928). De tiam plimultiĝas studoj de la pragmatikaj aspektoj de la rigidordaj lingvoj okcidentaj, kaj aperas adaptaĵoj de la teorio al tiaspecaj lingvoj. Tamen la Sekcia Raporto estas verkita en la terminoj kaj konceptoj de la Praga Skolo, la plej konvena kaj tradicia en la studoj slavlingvaj — precipe tial, ke la komunikada sistemo de Esperanto estas samtipa.

Ĉi tiun historian ekskurson mi faras responde al la objetoj de pluraj kolegoj, ke la «komunikstruktura teorio» estas io tro freŝdata (ekz-e *information structure* de *Halliday*, 1967) kaj ankoraŭ nematura por ĝin trakti en AdE. Ĝi eble estas nova en siaj aplikoj al la rigidordaj lingvoj; sed rilate al la lingvoj liberordaj (kia estas Esperanto) ĝi estas vaste konata, instruata kaj tute stabila jam preskaŭ cent jarojn.

2.2. Ĉu do libera?

Libera sintakse kaj semantike, la vortordo de Esperanto ne estas libera pragmatike; sekve ĝi reale ne estas arbitra. Teksto ignoranta la komunikan vortordon restas komprenebla — sed malbonstila kaj malfacile komprenebla; proksimume kiel teksto kun misuzataj artikoloj (kaj tiaj tekstoj ne maloftas).

2.3. La lingvoj rigidordaj

La pragmatika aranĝo de frazoj influas ankaŭ la lingvojn rigidordajn. Nemalofte okazas, ke ilia norma vortordo sintaksa koincidas kun la vortordo komunika, ekz-e ke en SVO-lingva frazo la subjekto estas temo kaj la objekto estas remao. Tamen se tiuj ordoj malsamas, tiam okazas kolizio, ĉar tiaj lingvoj ja uzas poziciojn en la frazoj por apartigi la frazmembrojn (subjekto, predikato ktp). En tiaj lingvoj la pragmatikaj permutoj aŭ tute maleblas (ne rezultigas sintakse validajn frazojn), aŭ ŝanĝas la signifon de la frazo.

Eblas pluraj solvoj de tia kolizio:

- (1) Uzi leksikan temigilon/remagilon (kiel menciite en la 2^a sekcio de la Raporto).
- (2) Uzi pasivon por permuti la subjekton kaj objekton.
- (3) Marki la temon kaj la remaon per intonacio.
- (4) Apliki iun el la specialaj rimedoj de rigidorda lingvo, servanta por eskapi la katenojn de la rigida ordo, kiaj fenditaj frazoj, ekstermeto (*dislocation*) ktp.
- (5) Rezigni pri la komunika strukturo.

(1) estas tute akceptebla ankaŭ en Esperanto — se koncerna leksika ilo ekzistas en ambaŭ lingvoj (tio ne ĉiam eblas, ekz-e en Esperanto malestas abstraktaj partikuloj similaj al la japanaj *wa* kaj *ga*).

Ankaŭ (2) estas valida rimedo en Esperanto, kvankam se eblas, pli bonstile estas uzi la aktivan aranĝon kun antaŭmetita akuzativa objekto.

Iajn prozodiajn rimedojn (3) oni sendube uzas, sed tio estas kampo neplugita. Povas esti, ke esperantistoj el diversaj landoj malsame interpretas ilin.

La rimedoj (4) estas superflujaj kaj fremdaj al la liberordaj lingvoj. Al la denaskaj parolantoj de rigidordaj lingvoj ili ŝajnas naturaj kaj memkompreneblaj; ili ne estas tiaj.

Cetere, tiaj rimedoj (4) estas pli okulfrapaj, ol la nepalpebla vortordo, kaj la gramatikistoj rimarkis ilin longe antaŭ ol oni ekkonsciis pri la komunikada strukturo de frazo. Tial oni tradicie rigardas ilin kiel *emfazilojn*; kaj fakte, la funkcioj emfaza kaj remaiga ne estas klare apartigitaj en tiaj lingvoj.

Kial ni en la Akademio de Esperanto zorgu pri la problemoj de rigidordaj lingvoj? Ĉar la lernantoj kies denaska lingvo estas rigidorda emas kontrabandi ties remaigajn rimedojn (en Esperanto malnecesajn kaj ofte malutilajn), tiom pli ofte, ke multaj lerniloj misinformas ilin pri la ĝusta vortordo esperanta. Necesas atentigi la instruistojn pri tiu problemo.

3. Emfazo kaj la pragmatika vortordo

Laŭ la tradicio de la gramatikoj de la modernaj okcidentaj lingvoj la gramatikoj esperantaj traktas ankaŭ la esperantan vortordon en la terminoj frazmembraĵ, ekz-e:

|| La norma vortordo estas: subjekto, predikato, objekto, adjekto. [PAG, §272]
|| La baza ordo de frazpartoj sekvas la ĉi-postan modelon ...:
|| subjekto – ĉefverbo – objekto – aliaj frazpartoj
|| ...
|| Se oni uzas alian vortordon, oni ne ŝanĝas la bazan signifon, sed nur kreas diversajn emfazojn
|| ... [PMEG 34.1]

Mi opinias tian prezenton maltaŭga.

Unue, mi tuj rimarkigu, ke estas absolute nenio emfazo en la antaŭmetitaj adjektoj de la frazoj:

|| Hieraŭ mi renkontis vian filon, kaj li ĝentile salutis min [FE §20].
|| Antaŭ tri tagoj mi vizitis vian kuzon kaj mia vizito faris al li plezuron [FE §20].
|| Antaŭ la domo staras arbo [FE §8].
|| En la mondo venis nova sento [La espero]
|| Sur neŭtrala lingva fundamento,
|| komprenante unu la alian,
|| la popoloj faros en konsento
|| unu grandan rondon familian. [La espero]

La postulo ke la adjektoj aperu frazofine validas por la angla lingvo, sed estas senbaza fantaziaĵo por Esperanto.

Tamen kompreneble, tute regule adjekto aperas fine de frazo, se ĝi estas remao:

|| Kie estas la tranĉiloj? — Ili kuŝas sur la tablo [FE §16].

Due, evidentas la kutima konfuzo de remao kaj emfazo.

Trie, la «normala vortordo» estas priskribenda ne rilate al la frazmembraĵoj, sed rilate al la komunikadaj unuoj (temo, remao).

Jen estas reala ekzemplo pri tipa misanalizo:

|| Frazparton,⁴ kiu kutime ne aperas unue en frazo, oni povas emfazi per tio, ke oni ĝin metas ĝuste en tian komencan pozicion:
|| • (...)

4 Ĉi tiu antaŭmetita «Frazparton» estas amuza kontraŭekzemplo por la aserto de ĝi malfermata: ĝi estas objekto aperanta unue ne pro emfazo (la tuta frazo estas senemfaza), sed ĉar ĝi estas temo en teksto pri lokado de frazpartoj.

- La sonorilon mi volas kaj devas trovi! [FA]
Normale: Mi volas kaj devas trovi la sonorilon.

La ekzemplo estas prenita el la fabelo «Sonorilo», kie «la sonorilo» estas la ĉefmotivo de la tuta fabelo; tute nature ĝi do aperas komence de la frazo en la *tema* pozicio. Parolante al si mem, la reĝido ne deklaras la celon de sia serĉo, li esprimas la remaan rezoluton «ĝin trovi ... eĉ se mi devus iri ĝis la fino de la mondo».

Por ilustru, kiom maltaŭgaj estas la instruoj de niaj lerniloj pri la vortordo, necesas konsideri rakontofluon. Hazarde mi prenu jenan pecon⁵:

|| li iris al la pordo kaj frapis. Ĝin tuj malfermis spritaspekta razita junulo...

Laŭ la gramatikoj, la antaŭmetita «Ĝin» estas emfaza. Tio malveras, en la frazo estas nenia emfazo. Ni tamen provu «normaligi» la vortordon laŭ la rekomendo de la gramatikoj:

|| li iris al la pordo kaj frapis. Spritaspekta razita junulo malfermis ĝin tuj.

Ĉu bele? Laŭ mi, aĉege. La rakonto ne plu fluas, ĝi stumblas. Sed eĉ pli ol tio, min frapas ia fremda akĉento. La «normaligita» frazo ne estas esperanteca.⁶

4. Aliaj menciindaj aferoj

Maleblas prezenti tutan teorion en nelonga akademia dokumento. La Raporto nur skizas la principon, invitante la gramatikistojn kaj instruistojn trovi kaj popularigi pluajn detalojn. Mi menciuj kelkajn demandojn, kiuj probable prezentiĝos al atenta lernanto, kaj kiujn instruisto pretu iel respondi.

4.1. Kromtemoj, kuliso, ligaĵo

La Raporto apartigas du ĉefajn komunikajn unuojn: temo kaj remao. Oni probable demandas, kio pri la resto de la frazo?

Antaŭ ĉio necesas menciuj, ke en unu frazo povas esti pluraj temoj. Unu el ili (depende de la ideoj de la informanto) estas la ĉefa, kaj la alia(j) estas kromaj. Kromtemon kiu indikas cirkonstancon la pragonoj nomas *kuliso*.

La temo(j)n kaj la remaon povas ligi verba grupo, kiu en la rusa tradicio estas nomata *ligilo* (связка; faklingve tiu vorto signifas *kopulo*), kaj en la tradicio ĉeĥa, *transiro* (*tranzit*). En Esperanto la ligaĵo kutime aperas inter la temo kaj la remao; dum en la hungara aŭ Latino ĝi situas frazo-fine.

En 2.1–2 *vidis* estas ligilo; dum en 2.3 *vidis* estas remao, kaj ligilo malestas.

«En la jaro 1887 la lingvo havis entute 904 vortradikojn» [Lapenna, «Retoriko»]: «la lingvo» estas la ĉeftemo, «904 vortradikojn» estas la remao, «En la jaro 1887» estas kuliso, «havis entute» estas la ligilo.

4.2. Ambigueco

Tre simpla frazo: «La kato kaptis raton» fakte estas ambigua. Egale bone ĝi povas aperi kiel respondo al du malsamaj demandoj:

5 A. Conan Doyle: La ruĝhara ligo. Tradukis Russ Williams. (En: A. Conan Doyle: La aventuroj de Ŝerloko Holms. Sezonoj, 2014).

6 La angla originalo respektas la pragmatikan vortordon kaj temigas la pordon per pasivo: *It was instantly opened by a bright-looking, clean-shaven young fellow.*

(1) Kion faris la kato? — Kaptis raton.

(2) Kion kaptis la kato? — Raton.

En ambaŭ okazoj la temo estas «La kato». Tamen en (1) la remao estas la tuta resto: «kaptis raton», dum en (2) la remao estas «raton», kaj «kaptis» estas la ligilo.

Ĉi tio ne estas problemo de teoria difino de remao, ĉi tio estas problemo de la lingvo, ĉar la du interpretoj reale validas kaj estas iom malsamsencaj.

Buŝe la diferencon povas esprimi paŭzeto antaŭ la remao:

(1) La kato | kaptis raton.

(2) La kato kaptis | raton.

Skribe tia rimedo mankas (krom eble kursivigo).

Simila problemo okazas pri la efiko de «ĉu» en la ĝeneralaj demandoj:

Ĉu vi ↘ | faris tion?

Ĉu vi faris ↘ tion?

Se tia prozodia malambiguigo funkcias (necesas aparta studo pri tio fare de la Prononca Sekcio), tiam la problemo estas en neadekvata interpunkcio.

4.3. «Ne» kiel remaigilo

Unu el la plej gravaj leksikaj remaigiloj estas la vorto «ne»:

«Ne Petro (R) vidis Paŭlon» = «Paŭlon vidis ne Petro (R)»;

«Petro vidis ne Paŭlon (R)»;

«Petro Paŭlon ne vidis [sed aŭdis] (R)»

Tamen «ne» estas iom malsimpla rimedo: en la frazoj kia «Petro ne vidis Paŭlon» ĝi negas la tutan aserton. Tial, por ne malŝpari lokon priskribante ĝian funkciadon, la Raporto ne mencias ĝin inter la leksikaj remaigiloj. Tamen en pli detala priskribo ĝi estas nepre mencienda.

4.4. Frazoj kontrastigaj

Ofte la vortordon motivas kontraŭmeto, implica aŭ mal-. Ĝin ankaŭ eblas uzi por klarigi la remaon, simile al testa demando. Ekz-e la frazo 2.3 aspektas pli nature en kunteksto:

Paŭlon Petro vidis, sed ne aŭdis.

4.5. Rilato al alternativaj konceptoj

De kiam la okcidentaj lingvistoj ekkonis la ideojn de la Praga skolo, ili kreis multajn diversajn variaĵojn pli aŭ malpli proksimajn, kun siaj terminoj kaj difinoj. Kelkaj el tiuj terminoj estas listigitaj en la Enkonduko de la Raporto.

Verdire, la Enkonduko iom konfuze prezentas tiujn terminojn — jen kiel sinonimojn, jen kiel apartajn konceptojn. En la antaŭlasta versio de la Raporto la Enkonduko estis iom pli zorge verkita. Mi prezentis [mian kritikon](#) de la amendo, sed ĝi ne konvinkis la sekcian plimulton.

Unu el la menciitaj alternativaj paroj estas *temo* kaj *komento* (angle *topic*, *comment*). Ĉi tiun paron ni trovas en NPIV, kiu tiurilate devancis PAG-on kaj PMEG-on. «Temo» estas difinita esence samkiel en la Raporto; «komento» aspektas kiel plaĉa alternativo por «remao».

La pragmatikan signifon de «komento» NPIV difinas jene: «Parto de la frazo, esprimanta tion, kion oni diras pri la temo». Tio do estas pli ol remao. Iuj interpretas tion kiel ĉion krom la temo, kaj tio ŝajnas pli simpla kaj klara. Interalie, oni ne hezitas pri komento, kiel oni hezitas pri remao en la sekcio [4.2](#).

Alivorte, la koncepto «remao» estas tiel fajna, ke per ĝi eblas diskuti pri la ambigueco de la frazo (mi taksas tion avantaĝo); dum la koncepto «komento» estas tiel malfajna, ke ĝi kaŝas la ambiguecon. Kolegoj povas taksi *tion* avantaĝo pedagogia; tamen tio kaŭzas aliajn problemojn, ekz-e:

- kia estu vortordo ene de tiu vasta frazparto?
- kiel priskribi la malsamajn prozodiojn de la du sencoj de ambiguaĵo?

La nociaro de la Praga skolo estas pli fajna kaj riĉa.

Krome, la angla *comment* probable estas pli multsignifa kaj ne tiom forte sugestas la ideon pri io akcesora, malĉefa, kiel ĝia respondaĵo en Esperanto kaj aliaj lingvoj (dum la remao estas iusence la plej grava parto de la frazo, kiu ofte sola povas sufiĉi kiel respondo). Ankaŭ la verba radik-karaktero de *koment-* povas ĝeni en derivaĵoj (*komentigi* ktp).

5. Konkludo

La Sekcia Raporto estas kompromiso inter diversaj preferoj de la sekcianoj. Kelkajn aferojn mi preferus esprimi alie; sed ankaŭ tiel estas akceptebla. Espereble tiu dokumento helpas pli bone kompreni la klasikan Esperanton, ĝian Fundamenton, kaj rezultigos pli ĝustan prezenton de la komunikada strukturo esperanta en la lernomaterialoj kaj instruado.